Proposition spécifique d'une action culturelle à long terme pour la M.C.E de Grésillon.	**Specifa propono de longdaŭra kultura agado por la Kulturdomo de Esperanto en Grezijono.**
Claude Bensimon, 25 juin 2011.	Claude Bensimon, 25 junio 2011.
Le projet culturel qui est à la base de mon engagement vis à vis de Grésillon, et qui ne vise qu'à s'insérer parmi les autres activités culturelles de la M.C.E.	La kultura projekto kiu estas la bazo de mia engaĝiĝo por Grezijono celas nur aldoniĝi inter la aliajn kulturajn agadojn de la Kulturdomo
Dès l'origine, j'avais fait savoir à la première personne qui m'avait contacté (en septembre 2008 je crois), que la réalisation du projet que je tache de présenter ci-dessous était à la base de l'engagement que je pourrais contracter vis à vis d'une nouvelle équipe d'administration de Grésillon. Il en a été fait mention dans le programme ou la profession de foi de la liste « Ouverture et changement ».	Ekde la komenco, mi informis la unuan personon kiu kontaktis min (en septembro 2008 mi pensas), ke realigado de la projekto kiun mi provas prezenti ĉi-sube estas la bazo de mia engaĝiĝo al nova administrado-teamo de Grezijono. Estis menciita en la programo de la listo "Malfermo kaj ŝanĝo".
J'avais fait valoir 3 éléments qui étaient en faveur de Grésillon dans ce projet :	Mi argumentis ke tri elementoj estas favoraj al Grezijono en ĉi tiu projekto:
1. Attirer à nouveau le même type de public espérantiste qui fréquentait Grésillon avant 1998.	1. Denove allogi la saman tipon de publiko kiu partoprenis en Grezijono antaŭ 1998.
2. Ouvrir le château à des groupes non-espérantistes, mais dont l'état d'esprit était en cohérence avec l'idéal espérantiste (Taiji Quan, yoga etc.., séminaires et formations dans des domaines compatibles avec l'espéranto) et ainsi, élargir la clientèle du château pour augmenter les rentrées financières et améliorer peu à peu l'état et l'aspect du château.	2. Malfermi la kastelon al ne-esperantistaj grupoj, sed kies spirito estu kongrua kun la esperantista idealo (Tajĝiĉuano, Jogo ktp., seminarioj kaj kursoj en fakoj kongruaj kun Esperanto) kaj tiel, pligrandigi la kliento-bazon de la kastelo por kreskigi la financan enspezon kaj plibonigi iom post iom la kondiĉon kaj aspekton de la kastelo.
3. Parallèlement, aider à lancer une « association d'éducation populaire généralisée », inspirée par les travaux du biologiste Henri Laborit, notamment dans son livre de 1974 « La Nouvelle Grille ». Son activité pourrait s'étendre à toutes les communes, par le biais d'associations-sœurs. Cette activité n'implique aucune dépense ou investissement de la part de Grésillon, et, au contraire, pourrait lui apporter, à long terme, de l'argent et de la notoriété, qui serait partagée avec	3. Dume, helpi al lanĉado de "Asocio de populara edukado", inspirita de la laboro de biologo Henri Laborit, kiel prezentita en lia libro de 1974 « La Nouvelle Grille » (La nova kadro). Ĝia aktiveco povus etendiĝi al ĉiuj komunumoj, pere de frataj asocioj. Ĉi tiu aktiveco ne engaĝigas al ajna enspezo aŭ investo de Grezijono, kaj, anstataŭe, povus alporti longdaŭre, monon kaj famon, kiu estus dividitaj kun Esperanto.

l'espéranto. Une telle association a existé à Lorient entre 1976 et 1981. Vous trouverez en pièces jointes des éléments d'informations sur les activités de cette association. Elle avait lancé des « ateliers d'expression libre » pour enfants, et des stages pour adultes, dont les thèmes étaient reliés par une idée comparable à celle de l'espéranto, et inspirés par les travaux de scientifiques, chercheurs en différents domaines, notamment concernant le fonctionnement du cerveau.	Tia asocio ekzistis en Lorient (Bretonio) de 1976 ĝis 1981. Bonvolu trovi en aneksaĵoj informojn pri la aktivecoj de tiu asocio. Tiu asocio estis lanĉinta "atelierojn de libera esprimo" por infanoj, kaj studperiodojn por plenkreskuloj, kies temoj estis ligitaj pere de ideo komparebla al tiu de Esperanto, kaj inspirita de la laboro de sciencistoj, esploristoj en diversaj kampoj, inter alie pri funkciado de la cerbo.
C'est ce dernier paragraphe que je vais développer ici, et mon engagement vis à vis de Grésllon, au même degré et même à un degré plus élevé dans la mesure où cet objectif était approuvé et sa réalisation possible dans le cadre des activités de la M.C.E.	Estas tiu lasta paragrafo, kiun mi disvolvos tie, kaj mia engaĝiĝo por Grésillon estas je la sama grado kaj eĉ pli alta grado se ties celo estos aprobita kaj ĝia realigo ebligita kadre de la aktivecoj de la Esperanto-Kulturdomo.
Le but de cette activité serait de préparer les esprits au changement pacifique des régimes économique, politique et relationnel dans la société de demain, par la diffusion de la connaissance scientifique, rendue accessible à tous. Elle procèderait par l'organisation de stages, séminaires, conférences-debats etc..	La celo de tiu agado estas prepari la mensojn al paca ŝanĝiĝo de ekonomiaj, politikaj kaj homrilataj reĝimoj en la morgaŭa socio pere de disvastigo de scienca kono, farita atingebla por ĉiuj. Ĝi okazos per organizado de kursoj, seminarioj, konferencoj, debatoj ktp.
Je ne vais pas résumer ici le contenu de ce petit livre d'Henri Laborit, qu'on peut trouver en librairie pour un prix modeste. (8,93 euros à la FNAC, par exemple).	Mi ne resumos tie la enhavon de tiu libreto de Henri Laborit, kiu troveblas en librovendejoj je modesta prezo. (8.93 eŭroj en FNAC, ekzemple).
Voici la présentation sommaire du livre sur le site de la FNAC	Jen resuma prezento de la libro farita de FNAC
(http://livre.fnac.com/a192323/Henri-Laborit-La-nouvelle-grille) :	(http://livre.fnac.com/a192323/Henri-Laborit-La-nouvelle-grille) :
« La nouvelle grille propose un moyen d'interprétation de l'expérience humaine en situation sociale. Le développement de la biologie cérébrale, qui commande aux comportements, a montré qu'il existait des liens entre la physique, dont la connaissance nous a permis de dominer le monde inanimé, et le discours logique. Celui-ci justifie toujours notre comportement qui, lui, n'exprime que les mécanismes inconscients aboutissant à la recherche de la domination entre individus, groupes sociaux, classes, États, blocs d'États. La biologie enrichit la physique de la notion d'information, qui n'est ni masse, ni énergie, mais mise en forme spécifique des systèmes vivants. Parmi d'autres, Aristote, Marx et Freud ont	***"La nova kadro provizas vojon por interpreti la homan sperton en sociaj situacioj. Progreso de biologio pri cerbo kiu kontrolas konduton, montris ke ekzistas ligoj inter fiziko, kies kono ebligis homojn regi la senaniman mondo, kaj logika diskurso. Tiu-ĉi lasta ĉiam pravigas nian konduton, kiu nur esprimas la senkonsciajn mekanismojn kondukante al serĉo de regado inter individuoj, sociaj grupoj, klasoj, ŝtatoj, blokoj de ŝtatoj. Biologio riĉigas fizikon alportante la nocion de informo, kiu estas nek maso nek energio, sed specifa formatado de vivantaj sistemoj. Inter aliaj, Aristotelo, Marks***

fourni de nouveaux concepts pour décoder le chaos de l'expérience et ont recherché les relations entre la matière et l'esprit. Mais ces théories ont pris naissance alors que la biologie, la biologie comportementale en particulier, n'était pas encore née. La nouvelle grille n'exclut pas les anciennes théories, mais les inclut de façon cohérente. Le monde n'est pas un magasin de pièces détachées. »	***kaj Freud havigis novajn konceptojn por malkodi la kaoson de homa sperto, kaj prienketis la rilaton inter materio kaj spirito. Sed tiuj teorioj ŝprucis kiam biologio, konduta biologio specife, ankoraŭ ne naskiĝis. La nova kadro ne ekskludas la malnovajn teoriojn, sed inkludas ilin kohere. La mondo ne estas vendejo de apartaj eroj. "***
Un petit extrait du livre (p. 17 et 18) permettra de mieux entrevoir des éléments de l'analyse de Henri Laborit, et les grandes lignes de sa proposition, qui inspireraient les activités de l'association proposée.	Malgranda citaĵo el la libro (p. 17 kaj 18) ebligas ekvidi la elementojn de la analizo de Henri Laborit, kaj skizon de lia propono, kiu inspirus la aktivecojn de la proponita asocio.
« (…) Nous verrons comment le fait de posséder un lobe orbito-frontal et des systèmes associatifs corticaux développés, permet à l'homme de traiter l'information, et par quels mécanismes son imagination ajoute de l'information au monde qui l'entoure. Comment cette propriété spécifique fut à l'origine de sa domination du monde inanimé et, plus tard, la base des hiérarchies de dominance uniquement fondées sur le degré d'abstraction de l'information technique, professionnelle, qu'un individu utilise. Nous verrons pourquoi les sociétés animales et les sociétés humaines sont soumises à cette pression de nécessité des structures hiérarchiques. Nous analyserons les mécanismes d'établissement des pouvoirs et des dominances, de la notion de territoire et de propriété, le mythe de la démocratie, de l'égalité et de la liberté, mots qui n'expriment qu'une affectivité pulsionnelle satisfaite, gratifiée ou au contraire aliénée, dépendante, soumise à la dominance de l'autre.	***"(...) Ni vidos kiel la fakto posedi orbito-fruntan kortekson kaj asociecajn sistemojn disvolvitajn, ebligas al homo trakti informon, kaj per kiaj mekanismoj lia imago aldonas informon al la mondo kiu ĉirkaŭas. Kiel ĉi tiu specifa proprieco estis la origino de homa superregado de la senanima mondo kaj, poste, la bazo de hierarkioj de superregado bazitaj nur sur la grado de abstraktado de profesia teknika informo, kiun individuo uzas. Ni vidos kial bestaj socioj kaj homaj socioj estas submetitaj de tiu premo de neceso de hierarkia strukturo. Ni analizos la mekanismojn kiuj establas la potencon kaj superregadon, la nocion de teritorio kaj posedeco, la miton de demokratio, egaleco kaj libereco, vortoj kiuj nur esprimas emociojn, kiuj estas sataj se kontentigitaj aŭ male malliberaj, dependaj, submetataj de la superregado de la alia.***
Nous tenterons de fournir les prémices d'une solution et, pour cela, nous développerons la distinction entre information professionnelle, introduisant l'individu dans un processus de production de marchandises, et l'information généralisée dont ce livre est un vade-mecum. (…) ».	***Ni provas provizi la komencon de solvo kaj tiucele, ni disvolvos la distingon inter profesia informo, enkondukante la individuon en procezon de produktado de varoj, kaj ĝeneraligita informo pri kiu ĉi tiu libro estas manlibro. (...) ".***
J'avais proposé cette idée à ma commune, mais l'adjoint au Maire, qui avait lu le livre, et avait bien compris l'intérêt de la démarche, avait tenté de convaincre les élus de l'intéger dans un projet culturel plus vaste pour la commune, sans succès apparent jusqu'à présent. Il vient d'ailleurs de	Mi proponis tiun ideon en mia urbo, kaj la vic-urbestro, kiu estis leginta la libron, kaj klare komprenis la valoron de ĝia celo kaj strebo, provis konvinki elektitajn respondeculojn enigi ĝin enen de larĝa kultura projekto por la urbo, tamen sen evidenta sukceso ĝis

démissionner de son poste.	nun. Li ĵus rezignis sian postenon.
A sa demande, j'avais rédigé une page pour montrer concrètement comment lancer les activités, dans l'hypothèse d'un lancement à l'automne 2009. Voici le contenu de cette note :	Post peto de li, mi estis skribinta paĝon por montri konkrete kiel komenci kaze de lanĉo en aŭtuno 2009. Jen la enhavo de tiu ĉi noto:
Propositions concrètes pour 2009 et 2010.	*Konkretaj proponoj por 2009 kaj 2010.*
12 novembre 2008	*12a de novembro 2008*
Dans le cadre d'une initiative qui tiendrait de l'université populaire, du réseau d'échange de savoirs, de l'éducation populaire, de la réanimation ou de l'aide à la manifestation d'une culture accessible à une grande diversité de participants, et issue également de cette diversité.	***Kiel parto de iniciato laŭ principoj de popola universitato, interŝanĝo de scioj, de reaktivigo aŭ helpo al okazigo de kulturo atingebla al ampleksa diverseco de partoprenantoj, kaj ankaŭ kreita de tiu diverseco.***
On pourrait envisager des sessions, accessibles au plus grand nombre, avec des thèmes reliés, diffusant des connaissances « synthétiques », ayant pour objectif d'améliorer la qualité de vie des participants, en veillant à écarter les apports émotionnels, idéologiques, et en veillant le plus possible à ce que le contenu ne soit pas fantaisiste.	***Oni povus antaŭvidi sesiojn, atingeblaj al plej multaj, kun ligitaj temoj, elsendante "sintezajn" sciojn, celante plibonigi la kvaliton de vivo de la partoprenantoj, zorgante eviti emociajn, ideologiajn kontribuojn, kaj zorgante, plej eble kiel eblas, ke la enhavo ne estu fantazia.***
Le plan-guide de ces sessions pourrait être élaboré à partir de la question :	***La gvid-plano de tiuj sesioj povus esti ellaborita sekve de la demando:***
Que serait-il utile de savoir pour mieux	***Kio estus utile scii pri***
• ***Se nourrir***	• ***Nutri sin***
• ***S'abriter***	• ***Loĝi sin***
• ***S'en sortir*** ***— Individuellement*** ***— Socialement***	• ***Elturniĝi*** ***— individue*** ***— socie***
• ***Bien se porter***	• ***Bone farti***
• ***S'informer***	• ***Informiĝi***
• ***Tendre vers le bien-être***	• ***Strebi al bonstato***
1. Une session pourrait être organisée sur le thème de la nutrition. Elle permettrait d'apporter aux participants des connaissances pratiques sur	***2. Sesio povus esti organizita pri la temo de nutrado. Ĝi donus al la partoprenantoj praktikajn sciojn pri***
• ***la physiologie de la nutrition, les besoins individuels,***	• ***fiziologio de nutrado, individuaj bezonoj,***

• *les réponses de l'industrie avec ses avantages et ses inconvénients,*	• *respondoj de industrio kun ĝiaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj,*
• *les réponses de l'alimentation biologique, ses avantages et ses inconvénients*	• *respondoj de organika manĝaĵo, ĝiaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj*
• *comparaison de la valeur nutritive de divers produits disponibles dans le commerce*	• *komparo de la nutra valoro de diversaj komerce haveblaj produktoj*
• *Le comportement du consommateur, ses besoins en information*	• *konduto de konsumantoj, iliaj bezonoj de informoj*
• *Exemples de solutions pratiques en tenant compte de <u>la gestion des coûts</u>, et des choix en fonction de son budget.* *Les intervenants pourraient être des personnes <u>capables de vulgarisation intelligente</u>, et s'appuyant sur des exemples très concrets : par exemple le Dr Lylian Le Goff, lorientais, auteur de plusieurs ouvrages sur la nutrition, un enseignant universitaire en biochimie et en physiologie de la nutrition, un biologiste généraliste, un nutritionniste classique, un médecin-nutritionniste de l'Association de médecine Kousmine, ou éventuellement Joël de Rosnay, biologiste, auteur du livre « La malbouffe », etc..*	• *ekzemploj de praktikaj solvoj konsiderante administradon de kostoj, kaj elektoj bazitaj sur la buĝeto.* *Intervenantoj povus esti homoj kapablaj de inteligenta instruado, bazita sur tre konkretaj ekzemploj: ekzemple Doktoro Lylian Le Goff, el Lorient, aŭtoro de pluraj libroj pri nutrado, universitata instruisto pri biokemio kaj nutrado-fiziologio, ĝenerala biologo, klasika nutradisto, kuracisto-nutradisto laŭ Kousmine Medicino, aŭ eble Joël de Rosnay, biologo, aŭtoro de "La malbouffe", (Manĝaĵaĉo) ktp.*
3. Une ou plusieurs sessions traiteraient de la protection de l'environnement, de l'exercice physique, de la médecine, des disciplines de développement personnel du corps et de l'esprit, (vérifications scientifiques à l'appui). On pourrait faire appel à des personnes de la région comme Jean-Claude Pierre de Nature et Culture, un médecin homéopathe, un médecin acupuncteur, un(e) kinésithérapeute faisant pratiquer une méthode holistique (Ehrenfried), ou la méthode Mézières. *Par la suite, une fois l'affaire bien lancée, on pourrait aussi faire appel à des personnes connues, comme par exemple un ancien chirurgien devenu psychothérapeute, le Dr Thierry Janssen, auteur de « La solution intérieure », ou encore quelqu'un comme David Servan-Schreiber, chercheur et psychiatre, auteur de plusieurs livres sur la nutrition et la santé, qui a été guéri d'un cancer par la conjonction intelligente de la médecine et de la nutrition.*	4. *Unu aŭ pluraj sesioj temus pri medio-protektado, korpa ekzerco, medicino, fakoj pri persona disvolviĝo de korpo kaj menso (kun apogo de scienca pruvoj). Oni povus alvoki personojn de la regiono kiel Jean-Claude Pierre de "Naturo kaj Kulturo", homeopati-kuracisto, akupunktur-kuracisto, kinezoterapiisto, per praktiko de holisma metodo (Ehrenfried), aŭ la metodo de Mezieres.* *Poste, kiam la afero estus bone progresinta, oni povus ankaŭ alvoki famajn homojn, kiel iama kirurgo kiu fariĝis psikoterapisto, Dr Thierry Janssen, aŭtoro de "La interno solvo", aŭ iu kiel David Servan-Schreiber, psikiatro kaj esploristo, aŭtoro de pluraj libroj pri nutrado kaj sano, kiu resaniĝis de kancero pere de inteligenta kombino de medicino kaj nutrado.*
5. Une session pourrait consister en un stage ou des ateliers de cuisine pratique, conçue pour être utilisable dans la vie de tous les jours, et prenant en compte l'équilibre alimentaire selon les besoins divers des travailleurs, des sédentaires, des personnes âgées. L'apport des cuisines traditionnelles étrangères, recadrées dans le thème de l'équilibre alimentaire. *Chaque atelier commencerait par les achats ensemble, faire la cuisine, manger ensemble, noter les recettes.*	*6. Sesio povus konsisti el studperiodo aŭ praktika kuirado-atelieroj, konceptita por esti uzebla en ĉiutaga vivo, konsiderante ekvilibran dieton laŭ la diversaj bezonoj de laboristoj, malnomadoj, maljunuloj. La kontribuo de eksterlandaj tradiciaj kuiradoj kadre de temo pri ekvilibrigita manĝo.* *Ĉiu ateliero komenciĝos per aĉetadi kune, kuiri, manĝi kune, noti la*

Les intervenants pourraient être des personnes de la région : je pense par exemple à quelqu'un qui tenait un restaurant à Lorient, et qui a animé des ateliers cuisine. Il y en aurait d'autres, et peut-être des mères de familles locales capables d'animer un atelier. Il y a aussi des ateliers qui fonctionnent dans certains Centres Sociaux, ou dans la Biocoop de Lanester.	*receptojn.* *Intervenantoj povus esti homoj de la regiono: ekzemple mi pensas pri iu kiu tenis restoracion en Lorient, kaj efektivigis kuirad-atelierojn. Estus aliaj, kaj eble lokaj patrinoj kapablaj konduki atelieron. Ekzistas ankaŭ atelieroj kiuj funkcias en iuj sociaj centroj, aŭ en Biocoop de Lanester.*
7. *Une ou plusieurs sessions pourraient être consacrées à l'apprentissage de <u>la lecture critique</u> des publicités, des informations écrites, radiodiffusées ou télévisées, des images etc.* *Des intervenants comme Daniel Schneiderman (« Arrêt sur image »), Colombe Schneck (« J'ai mes sources » sur France Inter), des scientifiques travaillant dans les domaines de l'alimentation, de la cosmétique, dans l'informatique etc. pourraient accepter d'animer des ateliers, après le démarrage et si le fonctionnement se déroule de manière satisfaisante.*	*8. Unu aŭ pli sesioj povus esti dediĉita al lernado de kritika legado de reklamoj, informoj, skribitaj aŭ elsenditaj per radio aŭ televido, bildoj ktp.* *Intervenantoj kiel Daniel Schneiderman ("Arrêt sur image"), Colombe Schneck ("J'ai mes sources" de France Inter), sciencistoj laborantaj en la fako de nutrado, kosmetiko, en komputado, ktp. povus konduki atelierojn, post la lanĉo se disvolviĝas kontentige.*
9. Une session pourrait être consacrée à l'explication ou à l'initiation, accessibles aux non-spécialistes, de l'économie, de la finance, etc.. Le contenu serait en prise directe avec les préoccupations courantes des participants : comprendre ce qu'on lit, que faire de ses économies, lecture critique des propositions des banquiers etc..	*10. Sesio povus esti dediĉita al klarigo aŭ malkovro, atingebla de ne-fakuloj, de ekonomio, financo, ktp. La enhavo estus en rekta kontakto kun la komunaj zorgoj de partoprenantoj: kompreni kion oni legas, kion fari kun sia mono ŝparita, kritika legado de la proponoj de bankistoj ktp.*
D'autres thèmes pourront être développés selon la demande et les suggestions qui ne manqueront pas d'arriver après le démarrage : méthodes peu connues mais intéressantes comme le dessin grâce au cerveau droit, accessible à tous en quelques jours, ou des techniques peu diffusées mais utiles pour le développement personnel et social, comme « Apprendre à dialoguer », ou aussi « Comment comprendre son automobile et savoir se sortir de certaines situations embarrassantes »..	*Aliaj temoj povos esti ellaboritaj laŭ peto kaj sugestoj kiuj sendube alvenos post la komenco: interesaj sed ne multe konataj metodoj kiel desegni per la dekstra cerbo, atingebla al ĉiuj ene de kelkaj tagoj, aŭ teknikoj ne vaste diskonigitaj sed utilaj por persona kaj socia disvolviĝo, tiaj kiaj "Lerni diskuti" aŭ kiaj "Kiel kompreni sian aŭton kaj kapabli elturniĝi el malfacilaj situacioj" ...*
Pour lancer ces sessions, il sera nécessaire de trouver une association dont l'objet correspond à cet objectif, ou d'en créer une. Certaines sessions pourraient être organisées par des associations ou institutions existantes : il suffira alors d'intégrer ces sessions dans le « catalogue » de l'association de base. On s'acheminerait vers une sorte de « consortium » d'associations.	*Por lanĉi tiujn sesiojn, necesos trovi asocion kies temo taŭgas al tiu celo, aŭ krei iun. Iuj sesioj povos esti organizitaj de ekzistantaj asocioj aŭ institucioj: sufiĉos tiam kunigi tiujn sesiojn en la "katalogon" de la baza asocio. Ni transirus al speco de "konsorcio" de asocioj.*
Une charte des règles à respecter dans les contenus et les intervenants pour ces cycles sera probablement nécessaire pour éviter les dérapages.	*Ĉarto de reguloj respektendaj por la enhavo kaj intervenantoj de tiuj aroj de sesioj verŝajne necesos por eviti elvojiĝojn.*
Si ce programme paraît ambitieux, c'est qu'il se place dans l'hypothèse d'une réussite et d'un développement ultérieur, et que dans ce cas il faut avoir des idées prêtes, mais il peut démarrer d'une façon très modeste, sans de très grands moyens.	*Tiu programo aspektas ambicia, ĉar ĝi prezentiĝas laŭ hipotezo de sukceso kaj posta disvolviĝo, kaj tiukaze necesas jam havi pretajn ideojn, sed ĝi povas komenciĝi modeste sen grandaj rimedoj.*

Enfin, dans l'hypothèse d'un développement futur, on pourrait prévoir la création ultérieure d'un site Internet, sur lequel les utilisateurs potentiels pourraient se renseigner et s'inscrire. Si cette idée se réalise, il serait intéressant d'avoir prévu des enregistrements vidéo de ces sessions, ce qui permettrait de constituer une bibliothèque dont les documents pourront être visionnés par les visiteurs du site.	***Finfine, kaze de estonta disvolviĝo, kreado de Interreta paĝaro povos esti antaŭvidita pere de kiu eventualaj uzantoj povos informiĝi kaj aliĝi. Se tiu ideo realiĝus, estus interese antaŭvidi registritajn filmojn de tiuj sesioj. Tio ebligus konsistigi bibliotekon kies dokumentoj estos videblaj de la vizitontoj de la retejo.***
Aucune des personnes, évoquée ou citée, n'a été approchée pour savoir si elle était d'accord pour intervenir. Par contre, dans la mesure où j'en connais un certain nombre, je pense que la probabilité qu'elles acceptent est assez grande.	***Neniuj el la elvokitaj aŭ cititaj personoj estis kontaktitaj por scii se ili konsentus por interveni. Tamen ĉar mi konas iujn el ili mi opinias verŝajna ke ili konsentos.***
La prise de contact ne pourra se faire qu'après la création de l'association, et par la personne qui serait chargée de l'organisation des sessions.	***Kontakto okazu nur post kreo de la asocio kaj fare de la persono, kiu respondecos de organizado de sesioj.***
Ce document est assez long, mais je n'ai pu le concentrer plus sans risquer de dénaturer le contenu. Je le soumets donc à votre réflexion. Amicalement Claude Bensimon	Tiu dokumento estas iom longa, sed mi ne povis resumi pli sen risko misprezenti ĝian enhavon. Mi submetas ĝin al via pripenso. Amike, Claude Bensimon